

BRAZILA ESPERANTISTO

57-A JARO

APRIL-O JUNIO 1963

N.^o 589-591

INSTITUTO COPACABANA - RIO DE JANEIRO



(Foto Hamilton C. Kozlowski)

Grupo de gelernantoj de la Esperanto-klasoj funkciantaj laŭ la nova Leĝo pri Direktlinioj kaj Bazoj de la Nacia Edukado. En la mezo de la lasta vico la direktoro de Instituto Copacabana, Prof. Eduardo Medina Kühner.

(Teksto sur la 15-a paĝo.)

ALIĜU AL LA XVIII-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO!
Fortaleza, Ceará, 13/19 - I - 1964

APRILHO-JUNIO 1963

57-a Jaro

N.º 589-591

BRAZILA ESPERANTISTO

("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara
dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal):

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 2.º

Telefono: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZIL

Senpaga por anoj de B. E. L.

Eksterlande: unu dolaro aŭ 15
respondekuponoj

QUOTA ANUAL DE ADESAO À LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO 1963

(De acordo com os Estatutos todos os
membros são automaticamente filiados à
organização mundial)

Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto"	600,00
Membro com direito ao Anuário: re- cebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	1.800,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	3.600,00
Membro Mantenedor: recebe o mes- mo que o Membro Assinante	5.400,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante	36.000,00
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante	72.000,00

Tôdas as importâncias devem ser remetidas
em cheque bancário ou vale postal à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
Rio de Janeiro, GB

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

BALANCETE REFERENTE AO ANO DE 1962

RECEITA

Saldo de 1961	141,00
Assinaturas	123.975,00
Comissões	49.236,00
Congressos	2.900,00
Contribuições	872.140,00
Cursos	127.285,00
Diversas Receitas	22.392,00
Donativos	20.185,00
Donativos a UEA	35.600,00
Fundo de Edições	266.400,00
Livraria	701.387,00
Revista	9.700,00
Subvenção Federal 1957 ..	20.000,00
	2.251.341,00

Congressos	600,00
Cursos	26.840,00
Despesas da Sede	100.530,00
Diversas Despesas	22.860,00
Donativos a UEA	35.600,00
Franquia	30.705,00
Fundo de Edições	7.415,00
Informação	24.400,00
Livraria	639.993,00
Material de Expediente ..	27.913,00
Móveis	104.384,00
Quotas UEA	662.414,00
Revista	309.030,00
Serviços de Secretaria	160.670,00
Túmulo de Zamenhof	100,00
Saldo para 1963	86,00

2.251.341,00

DESPESA

Academia de Esperanto ..	5.286,00
Assinaturas	37.180,00
Biblioteca	18.160,00
Comissões	37.175,00

Rio de Janeiro, 2 de Janeiro de 1963

Irani Baggi de Araújo
Tesoureira

BRAZILA ESPERANTISTO

57-A JARO

APRIL-UNIO 1963

N.º 589-591

CONGRESSOS BRASILEIROS DE ESPERANTO

Os 17 Congressos Brasileiros de Esperanto até agora realizados atingiram plenamente os fins que lhes determinam os Estatutos da Liga Brasileira de Esperanto: fortalecer a solidariedade entre os esperantistas, desenvolver o nosso Movimento e estudar os seus problemas.

As reuniões dos "peregrinos da estrela verde" vão cobrindo brilhantemente todo o território nacional. O I Congresso realizou-se no Rio de Janeiro (1907) e dele resultou a fundação da Liga. Vieram a seguir os Congressos de São Paulo (1908), Petrópolis (1909) e Juiz de Fora (1911). O V Congresso teria como sede Aracaju, onde era notável o trabalho esperantista, mas a 1.ª Guerra Mundial alterou os planos, de modo que a reunião se efectuou no Rio de Janeiro (1915). O VI (1921) e o VII (1923) também aqui se realizaram, este último para comemorar o 1.º Centenário da Independência do Brasil. Fomos a Vitória (1926) para o VIII Congresso. Depois do IX (1936) e do X (1945), os últimos que se reuniram no Rio de Janeiro, os Congressos têm buscado, em ritmo regular, o Sul, o Centro, o Norte. São Paulo pela segunda vez (1947), Belo Horizonte (1949), Recife (1952), Curitiba (1954), Niterói (1957), Salvador (1959) e Porto Alegre (1961).

Agora Fortaleza, formosa capital de mais de meio milhão de habitantes, acolherá as caravanas esperan-

tistas para o XVIII Congresso em Janeiro de 1963. O grupo de Fortaleza terá decerto a cooperação íntima dos outros grupos cearenses, permanentemente activos, de Baturité e de Limoeiro do Norte. As agremiações dos Estados limítrofes — Associação Potiguar e Instituto Piaulense coadjuvarão eficazmente.

O Regulamento dos Congressos Brasileiros de Esperanto, à semelhança do Regulamento dos Congressos Universais, prevê naturalmente só a adesão individual, não havendo congressistas colectivos. Mas isso não isenta os grupos de uma participação vigorosa, antes pelo contrário. Se, pois, cada um dos 70 grupos que se anunciaram nos anos recentes, inscrever os seus membros, teremos assegurado o êxito numérico e financeiro do Congresso. É claro que, assim como nos Congressos Universais as Associações Nacionais se representam pelos seus Delegados, também nos Congressos Brasileiros os grupos locais estarão presentes na forma do Regulamento.

Continuaremos, portanto, a série magnífica iniciada há mais de meio século. Para nós, brasileiros, os Congressos reunidos através do país oferecem uma demonstração eloquente da unidade espiritual do Brasil, patente por sobre as leves diferenciações regionais. E como essa admirável unidade é devida, entre outros factores, à unidade de idioma, pode-

mos imaginar o que representará para a Humanidade do futuro o uso de uma língua conhecida de todos os povos. Esse é o alto e nobre sentido da labor esperantista.

Organizando os Congressos, a Liga tem igualmente tido em vista que eles não se constituam em simples solenidades, embora esplêndidas e fulgentes. Temo-nos esforçado para que dos milhões necessariamente dispendidos, haja algum resíduo duradouro. Isso tem sido felizmente conseguido: aqui uma rua, ali um monumento e sobretudo livros, dentre os quais, para citar só um, *Elektitaj Poemoj*, que a Universidade da Baía e Knoedt imortalizaram também em Esperanto.

Façamos todo o esforço possível para que ninguém falte ao encontro de Fortaleza, onde o local, o povo, a estação do ano, a dedicada Comissão Organizadora compõem um ambiente incomparavelmente acolhedor. Os *verdes mares bravios*, celebrados por Alencar, já se aproximam, por sua cor, do símbolo do Esperanto.

48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Sofio, Bulgarujo, 3 10 — Aŭgusto 1963.

Honora Protektanto — Georgi Trajkov, Unua Vicĉefministro de Respubliko Bulgarujo.

G.G. Pompilio, Konstanta Kongresa Sekretario.

La Dua Bulteno enhavas informojn pri la programo, la Infana Kongreso, Cseh-Seminario, Junulara Kongreso en Vraca, Oratora kaj Belarta Konkursoj.

Ĝis 11/2/1963 enskribiĝis 1718 kongresanoj, el 36 landoj.

47.º CONGRESSO UNIVERSAL DE ESPERANTO

Realizou-se este Congresso, de 4 a 7 de agosto de 1962, em Copenhague, tendo como Alto Protetor o Primeiro Ministro Viggo Kampmann, Secretário Geral, G. G. Pompilio, Presidente do Loka Kongresa Komitato, Dr. P. Neergaard. Presidente do Congresso: S-ro H. W. Holmes. Compareceram 1550 congressistas, de 36 países dos cinco continentes. A capital da Dinamarca já foi, em 1956, a sede do 41.º U. K. E.

A Escola Técnica Superior, onde se realizou o 47.º Congresso é de vastas proporções, com modernos salões, salas de reuniões e várias galerias. Foi uma semana de atmosfera internacional com o encontro de velhos amigos e conhecimento de novos. Entre as saudações dos representantes das associações esperantistas ouviu-se a do nosso samideano João Vianna, representante da Liga Brasileira de Esperanto.

Como de costume, houve os tradicionais: Internacia Somera Universitato, Oratora Konkurso e Belarta Konkurso, este com 18 premiados, entre os quais nosso samideano Sylla Chaves. Banquetes, baile oficial, excursões, visitas, reuniões de 27 organizações esperantistas e o 7.º Internacia Infana Kongreso. Agora, o 48.º U. K. E., em Sofia, capital da Bulgária.

NOVIDADE EM MEDICINA

Leĉnolibro de Oftalmologio, Prof. D-ro Seŭĉi Kato da clínica oftalmológica da Universidade de Shinsku, Matumoto, Japão. Ilustrado Cr\$ 1.260,00

PROVERBARO ESPERANTA, de L. L. Zamenhof

Nova edição (Stafeto)


Em ordem alfabética e com índice analítico e sintético organizado por C. Register.

Introdução de G. Waringhien.

Prefácios de M.F. e L.L. Zamenhof.

Cr\$ 1.440,00

CONCURSO DE ESPERANTO ENTRE GINASIANOS



A Liga Brasileira de Esperanto, realizando a iniciativa do nosso samideano Dr. Miguel Timponi, aprovada em Congresso Brasileiro, abre mais uma vez o *CONCURSO DE ESPERANTO ENTRE GINASIANOS*, o qual visa a desenvolver o estudo da Língua Internacional entre a mocidade das escolas secundárias do Brasil.

Confiamos em que a recente introdução da Língua Internacional no currículo das escolas médias como prática educativa optativa, por efeito de decisão unânime do Conselho Federal de Educação, dará novo e vigoroso impulso a êsse interessante certame. Decerto os esperantistas, que já se acham lecionando a língua em ginásios, apreciarão devidamente a importância do concurso e estimularão os seus jovens alunos a tomar parte nele.

O tema para o Concurso no corrente ano será o *Descobrimento do Bra-*

sil. Aos vencedores serão distribuídos, conforme o Regulamento, os seguintes prêmios: 1.º — “Dr. Zamenhof”, medalha de ouro; 2.º — “Dr. Couto Fernandes”, medalha de prata; 3.º — “Dr. Baggi de Araujo” medalha de bronze; 4.º — “Dr. Tobias Leite, livro; — 5.º — “Dr. Nuno Baena”, livro; 6.º — Dr. Venâncio da Silva, livro.

Os trabalhos serão julgados por uma Comissão de 3 membros, nomeados pela Liga. O 1.º prêmio será concedido ao concorrente que obtiver um mínimo de 27 pontos, o 2.º ao que alcançar 20 pontos e os demais aos que tiverem mais de 15 pontos. Os pontos consistirão nas notas (1 a 10) dadas aos concorrentes sobre a correção da linguagem, o estilo e o mérito do trabalho, tendo-se em vista, em relação a este último, o conjunto, exposição, conceitos, e fidelidade.

O trabalho deverá ser dactilografado, a dois espaços de máquina, sem

ARTEFARITA LINGVO

La plej multaj homoj ne kredas, ke artefarita lingvo estas ebla. La kontraŭaj argumentoj similas al tiuj faritaj en la angla parlamento antaŭ pli ol cent jaroj, kontraŭ la fervojo. Tamen la fervojo ekzistas kaj funkcias. Rozoleo estas ekstrakto de rozoj, tamen oni povas fari rozoleon ankaŭ per hemia procedo. Ankaŭ Esperanto ekzistas kaj funkcias. Oni tradukis kelkajn frazojn el Esperanto al la angla kaj germana lingvoj kaj poste — sub konvena kontrolo — oni denove retradukis al Esperanto kaj fakte nenio estis ŝanĝita en ian sencon de la teksto.

Prof. B. Collinder

("La Espero", Junio-Julio 1962)

usar o verso, com um mínimo de três fo'has e um máximo de cinco, em formato de carta e não deverá trazer nome nem endereço do concorrente. Somente um pseudônimo marcará o trabalho. Juntamente com a tradução deverá vir uma sobrecarta fechada com o pseudônimo escrito por fora e no interior o nome e endereço do concorrente, acompanhados da declaração do Diretor do Ginásio de que se trata realmente de aluno matriculado em seus cursos.

Os trabalhos serão recebidos pela Liga até 15 de Novembro do corrente ano, e o resultado do Concurso será proclamado em 15 do mês seguinte.

A Liga prestará aos interessados outros esclarecimentos porventura necessários.

IRONIO KAJ BONHUMORO DE LINEO

La eminenta, fama sveda naturalisto Karlo de Linné (n. 1707 — m. 1778) laŭdire malŝatis la banon, kaj tio plurfoje kostis al li signifajn malagrablaĵojn.

Iutage, okaze de balo donita de la reĝo Frederiko la Granda, lia intima amiko, Lineo entuziasmiĝis por la ĝentila, eleganta grafino Marilia, tiamaniere ke li ne forlasis ŝin eĉ momenton.

Ne povante plu elteni tiun ĉeeston, ŝi iris al Frederiko, por plendi kontraŭ Lineo.

Frederiko la Granda vokis ĉi tiun kaj aparte sciigis lin pri la plendo de la grafino, kaj konsideris necesege, ke la amiko Lineo sin banu. Lineo foriris konfuzita. Sed post ses monatoj, li sendis el Svedujo, al la grafino, novan planton, kiun li ĵus estis klasifikinta, laŭ la botanika terminologio, kiel *Mari-lia fétida*, L. (M. malbonodora).

La franca naturalisto, konata verkisto Buffon, kvankam amiko de Lineo, kutimis kaŝite ataki lin. Foje, Lineo klarigis al siaj disĉiploj la tipajn karakterojn de nova planto, kiun li tuj klasifikis antaŭ ili:

— Ĉi tiu planto estas prigradata de atmosfero, kiu ŝajnas indiki ian propran malicaĵon. Ĝi devas esti nomata *Buffonia insidiosa* (B. perfida).

Lia disĉiplo Browall bone helpis lin por liaj laboroj. Lineo estimis lin, kiu estis tre humila kaj malriĉa. Pro tio, omage al li, Lineo donis al skrofulariaca planto la nomon *Browallia demissa* (B. humila, malfiera).

Kelkan tempon post la ricevo de la universitata titolo, prosperis al Browall atingi altan situacion, kaj li farigis malhumile fiera. Tiam Lineo klasifikis alian specion de la sama genro, kiel *Browallia elata* (B. altigita, altklasa).

Tamen, Browall poste forgesis kaj ne konsideris sian protektanton kaj majestron, eĉ satire kritikis lin.

Tiutempe, Lineo trovis trian specion de la sama genro, kaj gaje klasifikis ĝin: *Browallia alienata* (B. disigita, disrompita).

APERFEIÇO E SEU CONHECIMENTO

PSIKOLOGIO DE LA PLANTOJ

Clóvis Bevilacqua

Kiu vojaĝas tra kampoj kaj arbaroj, en helaj lunlumaj noktoj, tiu komprenas, ke ĝi ne estas senenca esprimo, kiun la vulgara retoriko tiel abunde uzis dum certa tempo kaj kiun ni ankoraŭ hodiaŭ ripetas, ĉar ĝi respondas al realaj faktoj, nome ke — *la tuta Naturo dormas*. Ne sole kelkaj floroj retiras siajn petalojn, fermante, por la nokta dormado, la atlasecan korolon, kie entenigas, kiel en ia incensujo, la esencoj puraj, kies sekreton nur la Naturo posedas: la arboj mem lasas velke pendi siajn branĉarojn, simile kiel ni la membrojn senfortigintajn ĉe la paroksismo de la dormemo.

Estas vero, ke iuj floroj, kaj el la plej bonodoraj, elvolvigas ĝuste, post kiam la nokto havigas al ili ombron kaj malvarmeton; sed tiuj belaj kaj aromaj "noktulinoj" similas niajn aktorinojn kaj voluptulinojn, kiuj, sur la scenejoj aŭ en la orgioj, ŝanĝas tagon je nokto. Ĉe iuj la histo de la petaloj estas tiel delikata kaj ili estas tiel neĝoblankaj, ke la suno en unu tago ilin rostus per siaj krudaj ondoj da lumo; tial ili malfermiĝas nokte, kiam la arbitaroj estas nigraj kaj ili blanke dispunktas la malgajecon de la ombro.

La honta timemeco de la sensitivo, la *mimosa pudica*, estas tre konata; sed niaj enlandidoj trovas, mi ne scias kian motivon, por suspekti la senkulpecon de ĉi tiu planto sentema por altuŝigoj, kaj nomas ĝin "malicetulino". Ili certe rimarkis, ke ekzistas ia virina disfandiĝa katmaniere-

co en tia retirigemo de la kurioza mimozaco.

En vido de ĉi tiuj faktoj ni do ne povas nei la ekziston de ia animo ĉe la plantoj, eble senintelekta, sed en kiu klare kaj ĉe kontakto elmontriĝas emociigemo kaj volkapablo.

Laŭ la tranĉa aŭ delikata koloro, laŭ la milda aŭ akra aromo de la floroj, lule balanciĝantaj ĉe la blovo de venteto, kvazaŭ moviĝantaj steloj, flarantaj sur la verda tapiŝo de la herbejoj aŭ sur la malhela mantelo de la arbaroj, ni ja povas difini ilian karakteron.

P. C. N.

Aqui está a magnífica versão, em Esperanto, do difícil trecho publicado no número anterior; versão do prof. Porto Carreiro Neto.

Grandes obras originais de Zamenhof.

ORIGINALA VERKARO

Prefácio, artigos, tratados, discursos; cartas, poesias — coligidos e ordenados pelo Dr. J. Dietterle. Enc. Cr\$ 2.940,00.

LETEROJ

A tragédia da vida de Zamenhof revelada pela sua correspondência recentemente descoberta.

Apresentação e comentários do Prof. G. Waringhien.

2 volumes enc. Cr\$ 3.600,00

CURSOS POR CORRESPONDÊNCIA

ELEMENTAR

SUPERIOR

MAGISTRAL

Diplomas de acordo com as normas da ACADEMIA DE ESPERANTO

BRAZILA KRONIKO

PIAUI

Teresina — Rádio Pioneira de Teresina dissendas, pere de Instituto Piauiense de Esperanto bonan Esperanto-programon, ĉiusabate, je 9 h-35, vespere.

MINAS GERAIS

São Lourenço — Clube Esperantista de São Lourenço (São Lourenço Esperanto-Grupo) aktive propagandas nian lingvon.

Direktas Esperantan kurson niaj samideanoj Antonio Sacchi Gomes kaj Kap. J. Muniz da Silva, delegito de U. E. A.

Bonajn artikolojn pri nia lingvo publikigas la tiea gazeto "São Lourenço-Jornal".

Uberlândia — En la 18-a de decembro okazis soleno por enoficigo de la nova estraro de Uberlândia Esperanto-Klubo kaj disdono de diplomoj. Brazila Esperanto-Ligo donis 52 elementajn kaj 4 Superajn Diplomojn al kursfinintoj, kiuj sukcesis en la ekzameno. La soleno efektiviĝis en la aŭditorio de Rádio Educadora de Uberlândia, kun parolado de D-ro Carlos de Almeida Wutke, Delegito de UEA.

RIO DE JANEIRO

Niterói — La 15-an de decembro 1962 Niterói Esperanto-Klubo celebris la 103-jaran datrevenon de la naskiĝo de L. L. Zamenhof, per notinda, brilega literatur-muzika solena kunveno ĉe la Konservatorio de Música de Niterói, sidejo de N.E.K. Estis unu el la organizintoj nia inda samideanino profesorino Marlice Botelho Beleza. Oni inaŭguris buston de la aŭtoro de Esperanto dum tiu vere frata, amena nokto.

Volta Redonda — Volta Redonda Esperanto-Klubo prezentis notindan raporton pri siaj aktivecoj dum la jaro 1962: kunsidoj, radioprogramoj, paroladoj, bultenoj, Esperanto-kursoj, biblioteko, gazetanoncoj k.a. Bonega laŭdinda laborplano por 1963.

Jen la estraro por 1963: Prez. Alberto Flores; Vicprez. Sósthene Moreira

da Costa; 1-a sek. Elzio Dias; 2-a sek. Francisco A. de Oliveira Filho; kas. Sérgio Pereira de Assunção; bibl. Eurico João Laux. Kontrolantoj: Antonio de Sousa Barbosa, João Rodrigues, João Andrade.

SÃO PAULO

São Paulo — Jen estas la nova estraro de la Associação Paulista de Esperanto por 1963: Prez. Adolpho Muniz Furtado; vicprez. Nelson Silveira; 1-a sek. Arlinda Gonzales; 2-a sek. Deodato França Mello; 3-a sek. Ilse Erna Jalowski; 1-a kas. Eurico A. Ribeiro; 2-a kas. Acyr de Carvalho.

Pindamonhagaba — Ni sciigis pri la fondo, la 7-an de novembro 1962, de "Pinda-Esperanta Klubo", post elementa Esperanto-kurso gvidita de nia samideano d-ro Waldomiro B. de Abreu. Bonan sukceson!"

PARANÁ

Ponta Grossa — Translogiĝis de la urbo Santa Maria en ĉi tiun urbon nia aktiva samideano Ennio José Toniolo, kiu tie intencas daŭre agi fervore al Esperanto.

RIO GRANDE DO SUL

Bajé — Esperanto Rondeto de Bajé. Komunikis, ke le Unuagrada Ŝtata Lernejo "Vicente de Paula" enkondukis la instruon de Esperanto por gelernantoj progresantaj.

Santa Maria — Nova estraro de la Esperantista Societo de Santa Maria, elektita la 25-an de aŭgusto 1962: Prez. d-ro Vitor Francisco Schuch; vicprez. d-ro Guilherme Groisán; ĉefsek. Ennio José Toniolo; help. sek. Fiorina da Silva e Sousa; kas. Thomé Osório Medeiros, bibl. Wilma Berenice de Mello.

São Leopoldo — Esperantista Societo de São Leopoldo elektis kaj postenigis sian novan estraron por la periodo de 1 decembro 1962 ĝis 1 decembro 1964: Prez. d-ro Modesto Belmonte de Abreu; vicprez. Carlos Henrique Dionísio; 1-a sek. Antonio Ferreira da Costa; kas. João Leonidio Ribeiro, bibl. Iracy de Andrade Miranda.

AVENUE ESPERANTO EN URBO UBERLÂNDIA

El inter la diversaj formoj de diskonigo de la esperanto-movado, apartan efikon havas la starigo de publikaj monumentoj kaj la identigo de stratoj kun la nomoj Esperanto kaj Zamenhof.

En Brazilo sekve de la agado de Brazilia Esperanto-Ligo jam ekzistas ĉirkaŭ kvardek tiaj monumentoj kaj stratoj, dissemataj tra la tuta lando, kaj ofte ni devas raporti pri iu nova strato Esperanto, aŭ ĵus starigita busto honore al la Majstro.

De la aktiva esperantista grupo de Uberlândia — floranta urbo en la ŝtato Minas Gerais — ni ricevis nun detalan, kun fotoj dokumentitan priskribon pri la inaŭguro de ilia avenue Esperanto.



S-ino Noêmia Rezende, edzino de la ĵus elektita urbestro de Uberlândia, solene inaŭguras la ŝildon de Avenue Esperanto. Ĝi estis la protektantino de tiu ĉi ceremonio.

La inaŭguron ĉestis la urbestro, S-ro Raul Pereira de Rezende, kaj lia edzino (kiu mem malkovris la ŝildon kun la nomo "avenida Esperanto") kaj aliaj eminentaj personoj, inter kiuj estis reprezentantoj el aliaj urboj de la ŝtato.

Parolis la prezidanto de Uberlândia Esperanto-Klubo, D-ro Milvar de Menezes, la urbestro kaj kelkaj ĉeestantoj. Meznombro kvincent personoj ĉeestis la solenaĵon, malgraŭ la forta pluvo falanta jam de tri tagoj.

La nova avenue Esperanto estas oficialigita de la komunuma leĝo n.º 904,

de la unua de marto 1961, subskribita de la urbestro, d-ro Geraldo Mota Batista.

Gratulon al ĉiaj bravaj samideanoj el Uberlândia!

KOREKTO

En nia lasta numero, kie aperis sur la kovrilo bildo de strato Esperanto en Uberlândia, la nomo de la urbo ne estis ĝuste menciita pro bedaŭrinda preseraro, kiun ni korektas. Cetere en du aliaj lokoj de la gazeto sur paĝoj 17 kaj 24 oni povas legi informoj rilatajn al la afero, kaj tie la urbo estas korekte citita. Ni pardonpetas al la simpatiaj legantoj de Uberlândia pro la nevola eraro.

Uzante la okazon ni dankas nian estimatan samideanon D-ron C. A. Wutke, Delegiton de nia Movado en Uberlândia, por la bonegaj informoj, kiujn li donis al ni pri la progresema urbo. Fakte, Uberlândia estas ne nur la tria urbo laŭ graveco de ŝtato Minas Gerais sed ankaŭ la urbo, kiu pli rapide kreskas en la interno de nia lando.

PRESENTEIE O SEU AMIGO COM UMA BIOGRAFIA DE ZAMENHOF

EM PORTUGUÊS:

Zamenhof, Iniciador do Esperanto — por A. López Luna, trad. de Carlos Domingues. Brochado Cr\$ 200,00. Enc. Cr\$ 400,00

EM ESPERANTO:

Vivo de Zamenhof — por E. Privat. Enc. Cr\$ 900,00
Zamenhof, Aŭtoro de Esperanto — por Marjorie Boulton Cr\$ 2.400,00

EM INGLÊS:

The Life of Zamenhof — por E. Privat, trad. de R. Elliott Cr\$ 600,00

EM FRANCÊS

Le Docteur Esperanto — por M. Ziolkowska Broch. Cr\$ 1.200,00. Enc. Cr\$ 2.460,00

PINDAMONHANGABA

La 2-an de decembro lasta, en la salono de la urba konsilantaro, la komunumestraro okazigis, kun granda brilo, solenan kunsidon por disdonado de normaj diplomoj liveritaj de Brazila Esperanto-Ligo al la gelnantoj de la unua elementa E-kurso organizita laŭ la komunuma leĝo n.º 285, de 20-6-1956, sub la direktado de nia samideano d-ro Waldomiro B. de Abreu. Esperanto en tiu urbo havas ĝeneralan apogon politikan kaj socian. Tiuj diplomoj estis ankaŭ subskribitaj de la klera urbestro d-ro Manoel César Ribeiro. Prezidis la kunvenon la prezidanto mem de la urba konsilantaro, s-ro Lloyd Figueiredo Pereira da Rocha, kiu invitis sidi ĉe la podio d-ron Paulo de Campos Azevedo, jura ĵugisto, kolonelon Francisco Gilson Filho, komandanto de II-a Ingenierarta Bataliono, vic-urbestron s-ron José Prates da Fonseca kaj aliajn ĉeestantajn aŭtoritatulojn, urbajn konsilantojn kaj reprezentantojn de societoj. Estis multenombra la ĉeestantaro. La gekursintoj kantis "La Esperon" kaj aŭdigis deklamadon kaj kantaĵojn esp-e. D-ro Abreu, per malgranda parolado, salutis nome de la urbo d-ron J. B. de Mello e Souza, el Rio de Janeiro, speciala invitito, kiu tuj faris bonegan kaj amuzan prelegon pri la Internacia Lingvo, akirante plenan plaĉon en ĉiuj aŭdintoj. La eminenta verkisto kaj fama esperantisto ricevis varman aplaŭdon. La temo estis — "Esperanto — fator de cultura e de harmonia" (Esperanto — faktoro de kulturo kaj de harmonio) kaj d-ro Mello e Souza gratulis la tieajn aŭtoritatulojn kaj la ĵusajn diplomitajn esperantistojn de tiu urbo, kiun li rajte kvalifis "altkulturista" en la Valo Paraíba. La prezidanto anoncis la elekton kaj enoficigon de la estraro de la ĵus fondita "Norda Princino Esperanto-Asocio", kiel omaĝo, al Pindamonhangaba tiel nomata ("Norda Princino"). Jen la unua estraro: Prez. Alais Ribeiro Ávila, vic-prez. Benedito Marques Monteiro, ĝen. sek. Ana Regina Salgado de Macedo, 1-a sek. Celita Fernandes, 2-a sek. José Luiz C. de Mello César, kas. Luiz Molinari, bib. Harumi Ando, kontrolantoj Walter Santiago, Ricardo Luiz Trigueirinho L. de Abreu kaj Ana Ribeiro Nunes (ĉiuj anoj de

N.P.E.A. estos ankaŭ membroj de BEL kaj de UEA). Dum la festo N.P.E.A. omaĝis s-inon Dulce Mello e Souza, la urbestron, la prezidanton de la urba konsilantaro kaj la ĉeestantajn esperantistajn delegitarojn el Taubaté, São José dos Campos kaj São Paulo (Associação Paulista de Esperanto). La prezidanto komunikis la instalon de novaj kursoj em 1963. La lokaj ĵurnaloj "Tribuna do Norte" (Norda Tribuno), "7 Dias" (7 Tagoj) kaj la sendstacio ZYR-47 (Rádio Difusora) presis kaj faris vastan propagandon kaj raporton, antaŭ kaj post la kunsido. D-ro Carlos Domingues, ankaŭ oficiale invitita, kiel prezidanto de BEL, estis reprezentata de d-ro Mello e Souza. En la sama tago, N.P.E.A. aranĝis ekspozicion de la "esperantista libro" en montra fenestro ĉe magazeno "Milad". Tiu ekspozicio daŭris tri tagojn.



*Komunuma Kurso de Esperanto
(Pindamonhangaba)*

HUGO STEINER

Nia samideano kortega konsilisto Hugo Steiner festis sian 85-an naskigtagon la 26-an de februaro. Fondinto kaj direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Vien I, li laboras ankoraŭ ciutage por la muzeo. Nun li verkas la alfabetan katalogon pri ĉiuj kolektoj de la muzeo.

LA BLUA BANTO

Romaneca novelo de

JÚLIA LOPES DE ALMEIDA

(Daŭrigo)

La dommastro prezentis sian karan kunvivantinon por laboro kaj goĵo, kaj al ŝi sian malnovan kamaradon, per abunde laŭdaj adjektivoj. Al ĉi tiu li aldonis rezervi surprizon...

D-ro Sergio iom miris pri tiu diro; tiam li parolis pri rememoraĵoj kaj fine devis klarigi la kialon de sia vizito. Pri tio li petis sekreton, absolutan diskretecon. Izidoro tuj levigis kaj mallevis la kurtenon ĉe la maldekstra flanko. S-ino Angelika faris la samon ĉe la dekstra. Kiam ili denove sidigis, sciavidaĵ, junulina voĉo tre klara kantetis en proksima ĉambro pecon de la muzika teatraĵo *Cavalleria Rusticana*.

— Bela voĉo! opiniis la advokato.

— Devas esti Lucila... jesis Izidoro, kun fiera rideto.

— Estas verŝajne Magdalena... kontraŭdiris s-ino Angelika.

Ili restis momentojn aŭskultante, ĝis la voĉo silentis. Tiam d-ro Sergio komencis paroli:

— Sinjorino, kiel ĉi tiu bona amiko scias, mi estas vidvo, havas valorajn proprajojn kaj bonan dispozicion por ilin pligrandigi, plenan bonfarton kaj filon dedicitan al bona kariero. Li estas fortika, konsiderata kiel modela junulo. Mi loĝas en terkultura bieno, kaj same kiel mi destinis min por la kampo, mia Raul dediĉis sin al la maro. Alia idealo, sed sama persisteco. Li estas marista subleŭtenanto, kaj devas vojaĝi kun sia kunlernanto post dudek tagoj, por instrua marveturado. Estis interkonsentite, ke mia filo irus al mia bieno por adiaŭi min, kiam antaŭ kelkaj tagoj li sendis al mi ĉi tiun telegramon...

D-ro Sergio malfaldis malrapide papereon kaj prezentis ĝin al s-ino Angelika.

Ŝi legis laŭte:

“Estas necesega via ĉeesto tie ĉi. Venu tuj. Raul”.

La telegramo klarigis nenion. S-ino Angelika redonis ĝin, malfermitan, al la

advokato, kun mieno naivega kaj demanda.

Li ridetis: ili ekscios ĉion.

— Kiam mi ricevis ĉi tiun telegramon, mi imagis ĉion, escepte de la vero. Mi konjektis mian knabon urĝe operaciota, pro kio li postulis mian ĉeeston, aŭ enmiksita en unu el tiuj modernaj dramoj de komplikitaj amrilatoj, aŭ riskanta dueli... Mi do ekkuregis al Rio-de-Janeiro, farante la plej kontraŭdirajn, maltrankviligajn supozojn. Kiam mi ĉirkaŭprenis lin, la unuan fojon post lia virigo, li ploradis. Tremante, idiotece, mi ne kuraĝis demandi lin... ĝis li deklaris ke li estas pasia.

S-ino Angelika suspiris, trankvila. Izidoro demandis lian amikon, kun intereso:

— Pura pasio... nur pasio...?

— Perfekte justa. Mia filo estas la prototipo de la honestulo, li ne konfesus riprocindan pasion... Kiel homa estaĵo, mi neniam juĝis lin liberigita de la grandaj homaj doloroj, sed pri tia, Dio volis indulgi lin, kaj mi dankas al Dio. Mia filo amas fraŭlinon, al kiu li deziras ligi sian destinton per la edzeco. Kaj kvankam li vojaĝos post dudek tagoj, li volas enŝipiĝi lasante ĉi tie, ne sian fianĉinon, sed sian edzinon. En certaj cirkonstancoj plibone estas havi certecon ol esperon! Sinjorino, kiam mia filo diris al mi la nomon de la patro de la junulino, mia koro batis pli forte. Ĝi estas tiu de malnova amiko! Kaj pro tio mi maltimis veni sola, frapli ĉe via pordo. Ĉu vi konsentas, ke via filino edzinigu kun mia filo?

S-ino Angelika fariĝis palega kaj muta. Izidoro tordis nerve la pinton de la lipharoj kaj demandis per raspa voĉo:

— Kiu el ili?

— Kiu el ili!... mire respondis d-ro Sergio.

Poste li daŭrigis:

— Mi pensis ke vi havas unu solan filinon... Certe mia filo konas nur unu!

— Eble li konas ambaŭ...

— Jen vi havas! Li tute ne supozas tion! Mi bone memoras, ke li eĉ donis al mi ŝiajn signojn: normalan staturon, sveltan, blondan...

— Ĝuste... jesis Izidoro; sed tio ankoraŭ ne klarigas nin sufiĉe. Mia kara amiko, en mia familio estas grava komplikajo, cirkonstanco neriparebla, kies konsekvencojn ni ne povas antaŭzorgi.

— Kiel?... murmuris surprize d-ro Sergio.

— Via filo supozas ami unu el miaj filinoj, sed eble li amas du, ĝemelajn, similajn, tiel similajn, ke la okuloj de la propra patrino kelfoje ilin konfuzas...

— Estas kvalito de bonaj patrinoj konfuzi siajn idojn. Mia patrino ĉiam vokis min per la nomo de mia frato, kaj mian fraton per la mia.

S-ino Angelika revenis al sia normala stato, post nerva skueto, kaj replikis:

— Ne temas pri mia amo, egala por ambaŭ. Fakte, ili estas similaj kvazaŭ unu animo en du korpoj... Kion unu pensas, tion la alia pensas; kion unu deziras, tuj volas la alia! Se (kio okazas ankaŭ al ĉiu el ni kaj iel nin kolektigas) malklara, malĝusta ideo reciproke enuigas ilin, tiam ili disiĝas, evitante unu la alian. Unu estas la spegulo de la alia, tiamaniere ke samaj estas iliaj gestoj, kaj sama ilia vestmaniero. Ili havas rimarkindajn originalaĵojn pri siaj lertecoj kaj preferoj; ili ŝatas la samajn fruktojn: same malplaĉas al ili la flava kaj la viola koloroj. Ili brodas kun sama perfekteco, kaj ilia skribkaraktero estas ĝuste simila. La maniero esprimi la pensojn estas identa, kio ŝajngigas kvazaŭ unu estas la fonografo de la alia. Tiaj ili estas, de kiam malgrandetaĵ, kuŝante en sia lulilo. Mi klopodis por kontentigi ambaŭ samtempe. Jam de tiu tempo mi pensadis kun timo pri ĉi tiu terura okazaĵo... kiu devus alveni... kaj hodiaŭ alvenis!

S-ino Angelika ne povis reteni larmojn.

— Tamen, bedaŭrinde la vivo ne fluas ĉiam ĉe luliloj. Reziĝnaci, do. Nun la plej grava afero estas scii, kiu el ili devas la unua forlasi la hejmon. La fianĉo estas serioza, laborema, el distinginda familio. Okazis la edziĝopeto kaj unu el ili devas forlasi nin. Ni konsentas, estas ja ŝia vico. Mi ne gardas ilin por fariĝi monaĥinoj. La patrino timas pereigi ilin pro la disiĝo, oni kredigis tion al ŝi... Efektive, ili estas tiom interligitaj... ĝi estos malfacila por mi... sed fine ĉi tiu geedziĝo havigos al ni la oportunon restigi ŝin post la edzinigo, eble unu jaron plu... Dum tiu tempo, iom post iom, ili kutimiĝos al la ideo pri la estonta disiĝo. Pro tio mi estas kontenta kaj aprobas la geedziĝon.

S-ino Angelika purigis la nazon, forviŝis la larmojn, malsargis sian koron. Ŝia edzo daŭrigis, sin turnante al la amiko:

— Pri tiu natura okazaĵo, eble mia edzino ŝajne havas eventualan kulpon, sed tion nur la scienco povus determini, se ĝi povus respondi ĉion kion oni demandas de ĝi. Prezentu al vi: Angelika apartenas al familio, kies pluraj membroj havas dunaskitojn; post sia edzinigo, ŝi ekdeziris ke ŝia unua akuŝo estu ĝemela, kaj ke la ĝemeloj estu inaj, blondaj, tiel similaj, ke oni konfuzus ilin! Nu, ĉiuj aliaj dunaskitoj el la familio estas brunetaĵ viro kaj ino. Ĉu la volo de mia edzino eble influis al tiu fiziologia kazo?

D-ro Sergio skuis la kapon por montri sian nescion pri tio. Poste, por ŝanĝi la subjekton, li rimarkigis:

— Mi tute ne komprenas, kiel mia filo povis nescii tian aferon, kaj estis vidinta nur unu el la junulinoj!

— Mi klarigas: antaŭe, kiam ni promenis kun ambaŭ filinoj, tiomaj estis la komentarioj, rimarkoj, atentaj rigardoj, ke ni, teditaj, decidis eliri ĉiufoje kun nur unu el ili. Kiam iras Lucila, restas hejme Magdalena. Kiam Magdalena iras, Lucila restas hejme... Eble, tiamaniere konante ambaŭ, via filo pensas, ke li konas nur unu. Mi do esperas, ke li povu determini, laŭ la loko en kiu la unuan fojon li vidis ŝin, tiun kiu el la du estos lia edzino... se ne okazis ankoraŭ interkomunikiĝo. Malgraŭ vigla atento, kelkfoje junulinoj lerte trompas nin. Malfacile mi trompiĝas, mi "scias ĉion"... tamen eble la afero jam progresis pli ol ni supozas.

— Estus preferinde, sed bedaŭre tio saĝnas kontestebla. Mia filo, tiom brava pri ĉio, estas timema rilate amaferojn. Li diris al mi, ke li ne kuraĝis konfesi sian amon, kaj ne riskus peti la manon de la junulino, kiun li amas, se li ne devus vojaĝi senprokraste. Tiel, li daŭrigis, se oni donos al mi nean respondon, neniu plu jetos sur min sian rigardon; se mi ricevos jesan respondon, mi forveturos feliĉe! Ŝajnas al mi, ke krom interŝanĝo de ridetoj kaj rigardoj... nenio pli. Se por iuj tio signifas neniaĵon, por aliaj valoras la ekzistadon. Mia filo apartenas al la lastaj... Ekstreme sentimentala...

S-ino Angelika daŭris fleksita de malespero, fikse rigardante la malplanan spacon en la ĉambro, kvazaŭ ŝi volus sondi la estontecon.

La vizago de d-ro Sergio ankaŭ ŝanĝiĝis de aspekto. Inter liaj brovoj profunda sulko fiksiĝis.

O ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

ITÁLIA — Foi inaugurada solenemente, no dia 21 de outubro de 1962, na cidade de Pistoia, nova rua Zamenhof. Eis os dizeres da tabuleta: "Via Ludovico L. Zamenhof (Dr. Esperanto)".

Radio Roma (caixa postal 120 — Roma, Itália) continua apresentando em sua seção de Esperanto, para 1963, excelente programa sob a direção dos Srs. Luigi Minaja e d-ro Vincenzo Musella.

DINAMARCA — Realizou-se em Odense uma "Semana Geográfica Esperantista", na qual fizeram-se representar 7 países. Houve 10 conferências feitas por eminentes especialistas e 15 apresentações de filmes, dos quais cinco em Esperanto. Foram organizadas três sessões, (dinamarquesa, holandesa e francesa), e belas excursões.

ESPANHA — Realizou-se em Valladolid o 23.º Congresso Espanhol de Esperanto, com sucesso. Dêle participaram

cêrca de 300 esperantistas, dentre eles vários vindos dos Estados Unidos da América do Norte, da França, do Japão, da Bélgica e de Portugal. As autoridades locais deram todo o apóio ao Congresso e tomaram parte nas principais reuniões.

FRANÇA — 1518 alunos de 66 escolas e liceus aprenderam o Esperanto durante o ano escolar 1961-1962. Foram, 108 alunos de 8 escolas do primeiro grau; 520 de 18 escolas do segundo grau; 112 de 7 escolas especiais; 425 de 22 liceus e 353 de escolas normais para professores.

HUNGRIA — Por ocasião do 50.º aniversário do primeiro Congresso Esperantista húngaro, 700 pessoas (dentre elas 160 estrangeiros) encheram a sala de festas do Palácio Municipal de Budapeste. O Presidente de Honra, Julio Eaghy e o Presidente da Associação dos Jornalistas demonstraram o papel do Esperanto como fator de paz internacional. Na mesma ocasião o "Grupo dos Cegos Esperantistas celebrou o 40.º aniversário de sua fundação.

MADAGÁSCAR — A Associação Esperantista de Madagáscar mantém um boletim bimestral redigido em língua malgache, com artigos em francês e em Esperanto.

(Trad. de "Revue Française d'Esperanto", fev. 1963).

NOVA ZELÂNDIA — Dentre as pessoas que tomaram parte no 28.º Congresso em Hawera, de 28 de dezembro a 1 de janeiro, havia diversos da Inglaterra e da Holanda. O congresso relatou que cêrca de mil jovens de ambos os sexos estudam Esperanto em 16 escolas, que 40 professores começavam a estudar a língua internacional em Dunedin.

POLÔNIA — O Esperanto tornou-se matéria obrigatória de ensino no liceu polonês de Sosnowiec, com permissão ministerial. O Presidente da República Polonesa declarou: "O Esperanto é uma língua utilíssima, com muitos adeptos entusiastas. Aprendam o Esperanto."

Oni povus percepti la flugadon de muŝo. Subite Izidoro firme forigis la embarason, dirante:

— Kunportu vian filon morgaŭ, nokte. Antaŭsciigu lin, laŭvole, pri la stranga situacio. Sed pri la afero ni nenion parolos al niaj filinoj, por ilin ne emocii... aŭ ne humiliĝi, en la okazo, se via filo rezignos sian pretendon... Se li firmos sian decidon, sed ne kapablos precize memori la tagon, en kiu li vidis la junulinon je la unua fojo, ĉiu el ili venos siavice al la vizitĉambro, kaj la kortuŝo eldiros ŝian sorton... La surprizo, kiun mi anoncis al vi, estus ĝuste ilia samtempe duopa prezentigo. Do, ĉio estos prokrastita ĝis morgaŭ. Unu plian klarigon: Se via filo rezignos la peton, vi alvenu sola, kaj ni tenos plu ĉion en sekreto. Mi esperas, ke ni solvu la aferon tuj, senhezite.

S-ino Angelika rigardis lin, kun petegantaj okuloj. Izidoro nur pludiris, per penetranta esprimo: — Ĝis tiu momento, morgaŭ... ŝŝ!

Trad. C. C.

(Daŭrigota)

R E C E N Z O

Niŭton J. Monteiro — *LAŬSISTEMA STUDO DE FUNKCIOJ* — São Paulo, 1960 — 34 p., 16 x 23 cm — Prezo ĉe Libroservo de B.E.I.: Cr\$ 100,00

Jen libro kiun oni devas rigardi "ne nur kiel verkon de studo, sed ankaŭ kiel elementon por la plivastigo de la matematika esprimado en Esperanto", laŭ prava aserto de la aŭtoro mem.

Al tio mi aldonas, ke ĝi prezentas — pro la klareco de la tekstobonan ekzemplon de didaktika verko, kaj mi ne hezitas rekomendi ĝin al la samideanoj studentaj Matematikon ĉe niaj universitatoj, kaj ankaŭ al tiuj plej progresintaj lernantoj ĉe la lasta jaro de mezgradaj lernejoj.

Aparte menciinda estas la sistemo, proponita de la aŭtoro, por legado de matematikaj formuloj kaj esprimoj. La starigo de reguloj pri tiu grava punkto estas efektive necesa kaj devas esti unuformigita en niaj matematikaj verkoj, se oni intencas uzi ilin por la parola instruado de tiu scienco.

La ĉefa temo de la libro: — studo de la variado de funkcioj — estas prezentita ne nur sisteme, sed precipe tre klare, kiel konvenas al scienca verko. En la tuta teksto mi trovis malmulte da preseraroj kaj nur du, aŭ tri, frazojn kies konstruo ŝajnas al mi stile neĝusta, sed kiuj tamen estas kompreneblaj.

El la proponitaj teknikaj terminoj nur la verbon *tangi* mi trovas superflua, ĉar ekzistas jam *tangenti* (vidu Plenan Vortaron, pg 463) kun la sama signifo.

Nia samideano Niŭton Monteiro kaj la eldonejo A. Oshiro estas nepre dankindaj por tiu bela kontribuajo al nia scienca literaturo.

F. P.

Rabindranath Tagore — *MALSATA ŜTONO* — kolekto da rakontoj. — Trad. el la bengala lingvo Lakṣmīswar Sinha. Eldona Societo Esperanto: 128 paĝoj, grandformataj, 9 tupaĝaj ilustraĵoj, Prezo en la libroservo de B.E.L.: Cr\$ 1.200,00

En Aprilo 1958 a la Estraro de U.E.A. traktis la inviton fare de Unesko al ĉiuj

organizaĵoj en konsultaj rilatoj, kun la peto ke ili kontribuu laŭeble al la realigo de la Granda Projekto pri la Reciproka Apezo de la Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj.

En sekcioj de la 43-a Universala Kongreso, okazinta en Mainz, la demando estis denove pritraktita kaj — interalie — montriĝis ke estus utila ekeldonadi serion da literaturaj verkoj kiel specialan kontribuon al la Granda Projekto.

Tri jarojn poste venas al la publiko la unua verko de la serio nomata "Oriento-Okcidento" nome: Malsata Ŝtono, kolekto da rakontoj de Rabindranath Tagore.

La verko enhavas, krom enkondukon kaj notojn pri la vivo kaj verko de Tagore, sep elektitajn rakontojn.

En la enkonduko Ivo Lapenna klarigas la celojn de la Granda Projekto kaj montras la unuajn paŝojn faritajn de U.E.A. por apogi ĝin. L. Sinha — instruisto ĉe la Tagore-Universitato de Santiniketan — verkis la notojn pri la vivo de Tagore. Ĝi estas vera biografio eseo pri la fama multverka hindio.

La rakontoj estas bonaj kaj certe ili plaĉas al ĉiuj. Ilia elekto ne estis facila, ĉar la aŭtoro skribis multajn, ĉiujn bonajn. Post la finlegado ni bedaŭras ke ili estas nur sep.

La lingvo de la tradukinto estas klara kaj estos bone ke ĉiuj aliaj venontaj verkoj de la serio estu tiaj.

L. A. M.

M. Rétot — *DE PARIZO AL LAZURA MARBORDO* — Turismo per Esperanto en Franclando — Eld. Moulins — Im. A. Pottier, 1959 — 32 paĝoj — 21cm x 13,5cm.


Jen interesa gvidlibro por veturado tra Francujo. Tre simpla, sen ia ajn komplikajo, la aŭtoro skizas al ebla vizitonto la plej taŭgajn vojojn por kompleta turisma vojaĝo, komence de Parizo ĝis la Lazura Marbordo (Côte D'Azur), en Nice. Laŭ tiu skizo ni devas ankaŭ preterpasi Lyon, Marseille kaj Cannes, krom aliajn pli aŭ malpli gravajn urbojn kaj urbetojn. Samtempe, por ke la vizitanto ne perdu tempon atentante al nevidindaĵojn, M. Rétot signas tion kaj tion kion li devas nepre vidi. Kaj en ĉiu urbo li haltigas la tu-

ESPERANTO EM SÃO LEOPOLDO

Esperantista Societo de São Leopoldo, fondita en la 7-a de Majo 1951, porporcie al la granda de la loko estas sendube la plej forta esperantista grupo en Brazilo laŭ la membraro. Nevola eraro, kiun ni nun korektas, faris, ke tiu multmerita grupo ne aperas en la listo publikigita en la numero de Oktobro-Dezembro 1962. Niaj bonkoraj samideanoj certe nin pardonos.

La konstanta animo de tiu brava grupo estas ĝia fondinto — nia sindona kaj tre kara amiko S-ro Carlos Henrique Dionísio: li, la edzino kaj ĉiuj gefiloj estas bonegaj esperantistoj. Estas mirinde vidi, kiel la infanoj parolas flue la Internacian Lingvon.

Sub la gvidado de la ĵus elektita Prezidanto, nia eminenta samideano Jugiŝto D-ro Modesto Belmonte de Abreu, la Societo plu faros sian laŭdindan laboron.



Familio Dionísio, São Leopoldo

riston kaj kondukas lin al historiaj pejzaĝoj, klarigante ke tie okazis, antaŭlonge, historiaj faktoj. Ni opinias, ke tiu broŝuro estos utila ne nur por realaj turistoj sed ankaŭ por tiuj, kiuj konas la lokojn laŭ libroj. Kelkaj fotoj, bone faritaj, donas plian ideon pri la urboj vizitotaj. De Parizo al Lazura Marbordo la vojaĝo estas ĉiam interesa laŭ la skizo de M. Rétot. La leganto atentu la antaŭon, ĉar gramatikaj eraroj dissemataj sur la vojo povas fali lin.

J. V. M.

ESPERANTO EN LA LERNEJOJ DE BRAZILLO

GIMNAZIO DE INSTITUTO
COPACABANA

La unuanima decido de la brazila Federacia Konsilantaro de Edukado, kiu interpretante la novan Leĝon pri Direktlinioj kaj Bazoj de la Nacia Edukado enkondukis Esperanton en la mezgradaj lernejoj kiel elekteblan edukan praktikon, komencas doni bonajn fruktojn.

Kun plezuro ni informas, ke la reputaciata Instituto Copacabana, en Rio de Janeiro, kies Direktoroj estas la kompetentaj edukistoj Prof. Eduardo Medina Kühner kaj lia edzino Prof-ino Maria Helena de Oliveira Kühner, ĵus kreis du Esperanto-klasojn, respektive por gelernantoj de la 1-a kaj 2-a serioj kaj de la 3-a, kaj 4-a. Entute vizitas la klasojn 50 gelernantoj. Estas rimarkinde, ke la enskribo estas nedeviga, sed la frekvento deviga, kio certigas bonan rezulton.

Laŭ la instruplano la kurso celas per la lernado de Esperanto, disvolvi edukajn praktikojn, kiel la korespondado kun alilandaj lernantoj, kaj aliajn sciojn, kiel la perfektigo de la konoj de la nacia kaj de fremdaj lingvoj, de geografio k.t.p.

Gvidas la klasojn nia samideanino Irani Baggi de Araújo, kiu posedas la diplomon de Profesoro Aprobata kaj estas estraranino de Brazila Esperanto-Ligo.

Interesatoj pri la ĝojiga novaĵo, inkluzive pri korespondado kun la junaj gelernantoj, povas sin turni al Instituto Copacabana, Rua 5 de Julho, 254, Rio de Janeiro, Brazilo.

BIBLIOGRAFIO

JARLIBRO DE LA UNIVERSALA
ESPERANTO ASOCIO

1962 — Unua parto 488 p.

Dua parto 211 p. + 13 p. por kompletigoj.

Informoj, raportoj pri la agado de U.E.A., de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, de Landoj, Neneŭtralaj kaj Fakaj Asocioj.

ORIENTO KAJ OKCIDENTO — *Al reciproka kompreno?* George Fradier — Tradukis C.D.A. Capp. Eldonita de U.E.A. kun la helpo de UNESKO. 50 p. 1962. Presita ĉe Zwagers, Rotterdam. Enhavo: La ne nedifinebla Oriento. La fosaĵo de la historio. La tempo de miskompreno. La pasejoj ne estas tiel sekretaj. Tiuj modernaj Orientanoj. La mistera Okcidento. La celo estas kompreno. La rolo de UNESKO.

D-ro L. L. Zamenhof — *Lingvaj Respondoj*. Konsiloj kaj opinioj pri Esperanto. Editoris: G. Waringhien. Sesa eldono. 133 p. Esperantaj Francaj Eldonoj — 11, rue P. Vergnes, Marmande, Francujo, 1962. El la Antaŭparolo: "Kiu lasos sin gvidi per tiaj konsideroj, kaj provos objektivie interpreti liajn Respondojn, tiu ne nur tiros el ili grandan profiton, sed ne povos sin deteni de admiro por la delikata sento pri nuancoj, por la largeco de vidado, por la preskaŭ senerara lingva instinkto, unuvorte por la saĝo kaj la genio de Lazaro Zamenhof."

HANS C. ANDERSEN — *La Marvirineto* Tradukita el la dana originalo de *I-Schleicher*, kun aŭtobiografio de magistro Svand Larson. 75 paĝoj (27x21 cm) el kiuj 20 estas tutpaĝaj kolorilustraj kaj 8 tutpaĝaj reproduktaĵoj de freskoj kun la portreto de la fabelisto.

La majstra traduko de d-ro Zamenhof, kiun enhavas la "Fundamenta Krestomatio", estis farita laŭ la germana traduko.

Jen la kvar unuaj volumoj, kiun STAFETO eldonis, el la deko, kiun ĝi planis eldoni en 1962, por festi sian 10-jaran aktivadon:

1. **L. L. ZAMENHOF** — *Proverbaro Esperanta*. Alfabeto ordigita kaj provizita de indeksoj analiza kaj sinteza, de C. Rogiste. Enkonduko de G. Waringhien. 196 p. 19 x 12 cm.

La dua eldono de tiu Proverbaro (4500 ekzempleroj, Esperantista Centra Librejo, Paris) jam de longe elĉerpigis; do estis feliĉa ideo reaperigi tiun gravan verkon.

La frazeologio — proverbaro en la lingvoj rusa, pola, franca kaj germana, verkita de la patro de L. L. Zamenhof, estas nun raraĵo, sed feliĉe la biblioteko de Brazila Esperanto-Ligo ĝin posedas.

2. **HENRI BEAUPIERRE** — *Specimene*. Parodioj kaj pasticoj de konata verkaĵoj, proze kaj verse. 138 p. 19 x 12 cm.

Interesa, agrabla legado precipe por tiuj, kiuj konas la parodiitajn kaj ŝerce imititajn verkojn.

3. **WILLIAM GILBERT**. **PLANLINGVOJ PROBLEMOJ** (Esperanto kaj la naturalismo). Antaŭparolo de W. J. A. Manders. 100 p. 19 x 12 cm.

Utila kompara studo, precipe por kontraŭbatali argumentojn kontraŭ Esperanto.

4. **KAHLIL GILVAN** — *La Profeto*. Trad. el la angla de Roan Orloff Stone. Antaŭparolo de Elias F. Shamon. Enkonduko de E. J. Liebeman. 128 p. 79 x 12 cm.

Naskita en Libanujo, li mortis 48-jara en Novjorko en 1931. Li kredis, ke "la tasko de ĉiu popolo ne estos forlasi la nacian karakteron, sed kontribui ĝin.

Du ienajn verkojn, el Editora Germinal (Rio de Janeiro) donacis al la biblioteko de Brazila Esperanto — ligo nia malnova, konata samideano Roberto das Neves: *Agustin Souchy* — *O Novo Israel*. Trad. Maria Jesusa Díaz y Sáiz — Kun enkonduko de *Roberto das Neves* — 175 p. kun pluraj bildoj. Bonega priskribo, impresoj de vojaĝo tra la progresema Israelo.

Han Ryner — *O Quinto Evangelho* — Trad. Maria Angélica de Oliveira. Kun enkonduko de *Roberto das Neves*, pri la Kvina Evangelio kaj la problemoj de Jesuo. 216 p.

ELEKTITAJ POEMOJ

RECENZO



L. H. KNOEDT

Tiu poemaro, antaŭ ne longe eldonita de Universitato de Bahia, sub la aŭspicioj de la Ministerio de Edukado, estis tre favore akceptita de la tutmonda esperantistaro. Jen estas kelkaj tekstoj de recenzoj, publikigitaj en gravaj esperanto-periodaĵoj.

BELGA ESPERANTISTO, (Belgujo) —
marto-aprilo 1961

En Brazilo okazas ke universitato eldonas esperantan verkon; ke ministerio subtenas tion kaj ke rektoro de universitato skribas la antaŭparolon!... Kia mirinda disvastigilo estas la lingvo Esperanto!... La traduko estas bonega, tre flua. Ni deziras al la libro la grandan sukceson, kiun ĝi meritas.

OOMOTO (Japanujo), julio-aŭgusto
1961

Ni varme rekomendas la volumon al ĉiuj literaturamantoj. Al profesoro Edgard Rego Santos, rektoro de Universitato de Bahia mi esprimas tutkoran gratulon pro la eldono de la libro. La poemoj de Castro Alves ĉiuj estas deklamindaj. Kaj deklaminte multajn el ili, mi samtempe kunĝuis la klasike belan tradukon de L. H. Knoedt...

POESIAS ESCOLHIDAS

CRÍTICA



CASTRO ALVES

Essa coleção de poemas, recentemente editada pela Universidade da Bahia, sob os auspícios do Ministério da Educação, teve acolhida muito favorável entre os esperantistas do mundo inteiro. Damos abaixo alguns trechos de críticas publicadas por importantes periódicos esperantistas.

ESPERANTISTA BELGA (Bélgica) —
março-abril 1961.

No Brasil uma universidade edita uma obra em Esperanto! Um ministério a patrocina e um reitor de universidade escreve o prefácio!... Que maravilhoso instrumento de divulgação é o Esperanto! A tradução é excelente, muito clara. Desejamos ao livro todo o sucesso que merece.

OOMOTO (Japão), Julho-agosto 1961.

Recomendamos calorosamente a obra a todos os apreciadores de literatura. Ao professor Edgard Rego Santos, reitor da Universidade da Bahia, nossos efusivos parabens pela publicação do livro. Os poemas de Castro Alves merecem, todos, ser declamados. E, tendo declamado muitos deles, pude, ao mesmo tempo, admirar a bela e clássica tradução de L. H. Knoedt...

SCIENCA REVUO (Iugoslavio), majo 61.

Ni devas esti dankaj al ĉiuj kiu kontribuis al la estigo de ĉi tiu volumo, kiu konigas al ni poeton samideanan, kiu mortis kiam la knabo Zamenhof komencis revii pri Internacia Lingvo... Multaj el ĉi tiuj poem-tradukoj estas tre sukcesaj. La nomo de la tradukinto, Leopoldo H. Knoedt ĝis nun ne estis konata en Esperantujo. Ni esperu, ke li ne same komete malaperos de sur nia poezia firmamento, kiel li aperis.

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST
(Australio), novembro-decembro 1961

... Leganto ricevas impreson, ke la traduko redonas la buntan riĉon kaj vervan vortlereton de mirinda originalo; nur vera poeto povus tiel transporti la koloron kaj sencon tiel senperde en ilian novan lingvoformon...

EL POPOLA ĈINIO, (Ĉinujo), n.º 3, 1961

La traduko estas konsciencie farita, kolorriĉa kaj viveca, ĝi meritas multan laŭdon kaj taŭgan lokon sur la bretaro de ĉiuj poezi-amantoj... Mi gratulas la brazilan samideanaron, ke ĝi kontribuas al la esperanta literaturo per tia grava libro kaj atendas ankoraŭ aliajn same bonajn eldonaĵojn.

THE BRITISH ESPERANTIST (Anglujo),
majo 1961.

Se oni akceptas la supozon, ke Esperanto kapablas redoni poezion egale bone de kiu ajn nacia lingvo la konkludo estas neevitebla: la nomon Knoedt devus koni absolute ĉiu studanto de la Esperanta literaturo... Knoedt plenumis heroan kaj eminentan kompetentan laboron, kiu firme rangigas ĉi tiun verkon inter la klasikaĵoj de nia tradukita literaturo...

PACO (Svedujo), januaro 1961.

Domaĝe ke la spaco de "PACO" estas tro limigita por povi doni tian atenton al tiu ĉi poemaro, kiun ĝi meritas...

REVISTA CIENTÍFICA (Iugoslavia),
maio 1961

Devemos ser gratos a todos os que contribuíram para o aparecimento deste livro, que nos apresenta um poeta nosso co-idealista, e que morreu quando o menino Zamenhof começava a sonhar com uma língua internacional... O nome do tradutor, Leopoldo H. Knoedt era, até agora, desconhecido no mundo esperantista. Esperemos que não desapareça do cenário de nossa poesia tão bruscamente como apareceu.

O ESPERANTISTA AUSTRIANO
(Austrália), novembro-dezembro 1961

O leitor sente que a tradução reproduz a riqueza, a verve e a elegância de um admirável original; só um verdadeiro poeta poderia transportar tão completamente para outra língua o sentido e o colorido da obra.

DA CHINA POPULAR (China), n.º 3 1961

É uma tradução consciente, cheia de colorido e de vida; merece muitos louvores e um lugar de honra na biblioteca de todos os amantes da poesia. Cumprimos os esperantistas brasileiros pela edição deste importante livro, e esperamos outras edições igualmente boas.

O ESPERANTISTA BRITÂNICO (Inglaterra) maio, 1961

Se aceitamos a hipótese de que o Esperanto é capaz de, igualmente bem, traduzir poesia de qualquer língua, a conclusão é inevitável: o nome de Knoedt deveria ser, absolutamente, conhecido por todo o estudante de literatura do Esperanto... Knoedt realizou um trabalho heróico e competente por excelência, que vem situar essa obra entre os clássicos de nossa literatura traduzida...

PAZ (Suécia), janeiro 1961

É pena que o espaço disponível em "Paz" seja tão limitado para dar a essa coleção de poemas toda a atenção que nos merece...

ESPERANTO-REVUO (Germanujo),
februaro 1961

Konsiderinda fakto estas, ke la libro estas eldonajo de la Universitato de Bahia... Laŭdinda estas la laboro de la tradukinto, samideano L. H. Knoedt, kiu liveris bonstilan, glatan esperanta tekston...

NORDA PRISMO (Svedujo), Junio 1960

La tuta poemaro povas konvinki la leganton ne nur pri la eksterordinara signifo de la sudamerika poeto, sed ankaŭ pri la serioza talento de la tradukinto eminenta...

DANSK ESPERANTO-BLAD (Danujo),
januaro 1961

Tuj ĉe la eklego oni sentas, ke oni staras antaŭ majstroperko, kaj plie, ke oni havas antaŭ si lertan tradukanton, kiu ne nur scipovas Esperanton, sed ankaŭ scias la rimedojn de la poezio;... entute lia stilo estas plaĉa kaj lia esprimkapablo eksterordinara, tiel ke oni preskaŭ sentas, ke la poemo estas originale en Esperanto.

(daŭrigota)

REVISTA DE ESPERANTO (Alemanha),
fevereiro 1961

É notável o fato de que o livro foi editado pela Universidade da Bahia. Merece louvores o trabalho do tradutor, L. H. Knoedt, que nos oferece em esperanto um texto fluente e em bom estilo.

PRISMA NÓRDICO (Suécia), junho 1960

Toda essa coleção de poemas faz o leitor convencer-se, não apenas da extraordinária significação do poeta sul-americano, mas também do invulgar talento do eminente tradutor.

FÔLHA DINAMARQUESA DE ESPERANTO (Dinamarca), janeiro 1961

Logo ao começar a leitura sentimos estar ante uma obra-prima, e, mais, que se trata de um tradutor hábil, que, não somente domina o Esperanto, mas também conhece os recursos da poesia... Seu estilo é de todo agradável e sua capacidade de expressão extraordinária, de tal modo que o leitor poderia pensar que o poema foi escrito originalmente em Esperanto.

(continua)

INTERCÂMBIO DE HOSPEDAGEM

ENTRE ESPERANTISTAS BRASILEIROS E EUROPEUS

Nosso membro vitalício Sylla Chaves visitou-nos para propor um plano que visa a intensificar a propaganda do Esperanto entre os jovens do Brasil. Para que esse plano possa tornar-se realidade, é preciso auxílio financeiro, em espécie ou em trabalho de todos aqueles que quiserem colaborar.

O plano tem em vista a realização de um concurso em novembro do corrente ano para selecionar os cinco melhores candidatos, nascidos a partir de 1.º de janeiro de 1940, para uma viagem de um mês à Europa, inteiramente por conta do movimento esperantista.

Na mesma ocasião, cinco jovens europeus, igualmente selecionados por concurso em cinco países de língua diferen-

te, seriam enviados ao Brasil, também por conta do movimento esperantista. A viagem deverá ocorrer nas próximas férias de verão (dezembro-fevereiro).

Sylla Chaves responsabiliza-se pela hospedagem completa no Rio de Janeiro, durante 10 dias, de todo o grupo selecionado. Oferece também os primeiros 100 dólares (Cr\$ 62.000) para as despesas das viagens internacionais aéreas (custo total: 3.325 dólares por conta dos esperantistas europeus e 2.150 dólares por conta dos brasileiros).

A pedido de Sylla Chaves a Liga Brasileira de Esperanto prontifica-se a receber as contribuições daqueles que desejarem colaborar, contribuições que serão utilizadas no momento oportuno. Quaisquer sugestões poderão ser enviadas para o responsável pelo plano:

Prof. Sylla Chaves

Rua Dona Mariana, 97, ap. 805
Botafogo — Rio de Janeiro
Telefone: 26-4838

LA LOGANTARO DE BRAZILLO

La lasta popolnombro (1950) kies rezultatoj estas diskonigataj, taksis la logantaron de Brazilo al 70.799.352 de homoj. Brazilo estas la latina lando

kun plej granda logantaro. Jen estas la logantaro de ĉiu federacia unuo kaj de la respektivaj ĉefurboj:

NORDO

Rondônia (RO)	70.783	Pôrto Velho	51.049
Acre (AC)	160.208	Rio Branco	47.882
Amazonas (AM)	721.215	Manaus	175.343
Rio Branco (RB)	29.489	Boa Vista	26.168
Pará (PA)	1.550.935	Belém	402.170
Amapá (AP)	68.889	Macapá	46.905

NORDORIENTO

Maranhão (MA)	2.492.139	São Luís	159.628
Piauí (PI)	1.263.368	Teresina	144.799
Ceará (CE)	3.337.856	Fortaleza	514.818
Rio Grande do Norte (RN)	1.157.258	Natal	162.537
Paraíba (PB)	2.018.023	João Pessoa	155.117
Pernambuco (PE)	4.136.900	Recife	797.234
Alagoas (AL)	1.271.062	Maceió	170.134
Fernando de Noronha (FN)	1.319		

ORIENTO

Sergipe (SE)	760.273	Aracajú	115.713
Bahia (BA)	5.990.605	Salvador	655.735
Minas Gerais (MG)	9.798.880	Belo Horizonte	693.328
Serra dos Aimorés	384.297		
Espírito Santo (ES)	1.188.665	Vitória	85.242
Rio de Janeiro (RJ)	3.402.728	Niterói	245.467
Guanabara (GB)	3.307.163	Rio de Janeiro	3.307.163

SUDO

São Paulo (SP)	12.974.699	São Paulo	3.825.351
Paraná (PR)	4.110.000	Curitiba	361.309
Santa Catarina (SC)	2.146.909	Florianópolis	98.520
Rio Grande do Sul (RS)	5.448.823	Pôrto Alegre	641.173

CENTRO-OKCIDENTO

Mato Grosso (MT)	910.262	Cuiabá	57.860
Goiás (GO)	1.954.862	Goiânia	153.505
Distrito Federal (DF)	141.742	Brasília	141.742

La lando havas 2.910 komunumojn :
ĉefloko de ĉiu komunumo estas urbo.
El la komunumoj 61 havas pli ol 100.000
logantojn. Krom 19 el la cititaj ĉefurboj,
tiaj komunumoj estas jenaj :

1. Nova Iguaçu (RJ)	359.364
2. Campos (RJ)	292.292
3. Santos (SP)	265.753
4. São Gonçalo (RJ)	247.754
5. Santo André (SP)	245.147
6. Duque de Caxias (RJ)	243.619
7. Campinas (SP)	219.303
8. Campina Grande (PA)	207.445
9. São João de Meriti (RJ)	191.734
10. Juiz de Fora (MG)	182.481
11. Pelotas (RS)	178.265
12. Colatina (ES)	154.966
13. Petrópolis (RJ)	150.300
14. Ribeirão Preto (SP)	147.361
15. Vitória da Conquista (BA)	143.486
16. Sorocaba (SP)	138.323
17. Londrina (PR)	134.821
18. Montes Claros (MG) ..	132.502
19. Caxias (MA)	129.271
20. Teófilo Otoni (MG) ..	129.111
21. Governador Valadares (MG)	122.209
22. Lajes (SC)	121.027
23. Santa Maria (RS)	120.975
24. Jundiá (SP)	118.874
25. Itabuna (BA)	118.417
26. Piracicaba (SP)	116.190
27. São Caetano do Sul (SP)	114.421
28. Garanhuns (PE)	113.392
29. Jequié (BA)	112.940
30. Olinda (PE)	109.953
31. Bacabal (MA)	108.509
32. Caratinga (MG)	107.654
33. Caruaru (PE)	106.231
34. Jabotão (PE)	105.261
35. Ilhéus (BA)	104.429
36. Canoas (RS)	104.257
37. Maringá (PR)	104.131
38. Caxias do Sul (RS)	102.702
39. Guarulhos (SP)	101.273
40. Rio Grande (RS)	100.378
41. Santo Amaro (BA)	100.221
42. Moji das Cruzes (SP)	100.194

LA SANKTA BIBLIO

Trad do original por Za-
menhof. Enc. Cr\$ 1.320,00

PENSOJ

La homo estas lernanto; la doloro,
lia mastro, kaj neniu sin konas dum li
jam ne suferis.

Alfred de Musset

Jen estas la tri aferoj pli malfacilaj
en ĉi tiu mondo : Teni sekreton, par-
doni ofendon, bone uzi la tempon.

Benjamin Franklin

Prefere estas elporti malbonan agon
ol ĝin fari.

Cicerono

La promesoj estas forgesitaj de la re-
gantoj, sed neniam de la popoloj.

Mazzini

La patrujo estas kiel la familio; ni
komprenas ĝian tutan valoron nur kiam
ni ĝin perdas.

G. Flaubert

La malfacilaĵoj estas stimulo por tiuj,
kiuj scias lukti.

Renato Kehl

La forgeso estas la morto de ĉiu, kiu
vivas en la koro.

A. Karr

Unu el la precipaj roloj de la envio
estas servi kiel gvidilo al la kalumnio.

Rastus

Se la patrinoj regus la landojn, ne-
niam okazus militoj.

Mendonça Tremont

Parolu nur kiam estas necese, kaj
diru nur duonon de tio, kion vi pensas.

Anonima aŭtoro

TRA LA MONDO

Curso de Esperanto em discos composto de:

- a) — livro com 48 leituras variadas
- b) — série de 6 discos, cada face dos
quais gravada por esperantista dos
países seguintes: França, Itália, Ale-
manha, Holanda, Finlândia, Jugos-
lândia, Polônia, Marrocos, China,
Japão, Inglaterra, Estados Unidos.
- c) — Compêndio da gramática do Es-
peranto.

Cr\$ 14.400,00

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO"

FONDIDA EN LA 29-a DE JUNIO 1906

LA LOKA GRUPO DE LA URBO RIO DE JANEIRO — PRAÇA DA REPÚBLICA, 54 — TEL.: 42-4357 — MALFERMITA EN LA LABORTAGOJ DE LA 8-a ĜIS LA 18-a KUNVENOJ: SABATE DE LA 14-a ĜIS LA 18-a

TELEVIDO

La 14-an de Decembro lasta, okaze de la Zamenhofa festo, en la tre aŭskultata programo *Rondaj Tabloj* de la televida stacio Continental la ŝatata ĵurnalisto S-ro Gilson Amado intervjuis la Prezidanton, P-ron João Baptista Melo e Sousa pri liaj spertoj rilate Esperanton.

GRUPAJ KUNVENOJ

Kelkaj sugestioj — Materialo

Ĉiam en la sama semajntago je fiksita horo devas okazi kunveno amuza kaj instrua. Kvankam ne estas eble starigi normon validan por ĉiaj cirkonstancoj, ni bone konsciu, ke niaj kunvenoj priatentu du gravajn celojn: perfektigi la grupanojn pri uzado de la lingvo kaj rezultigi daŭran fidelecon al nia Movado.

Alterna gvidado estas tre rekomendinda, t.e. en ĉiu kunveno samideano antaŭe elektita gvidas la prezentadon de la programeroj, aranĝante ilin laŭ siaj povoj kaj emoj. La gvidanto devas klopodi por ke ĉiuj ĉeestantoj partoprenu aktive la kunvenon. Tiel, ne estus bone se la programo konsistus nur el unu parolado.

Montrigis tre efika, precipe por komencantoj, la disdonado de kartoj kun malgranda teksto legota por respondi aŭ por daŭrigi la tekston antaŭe legitan de alia membro.

Abunda materialo por la kunvenoj troviĝas en la biblioteko de la institucio. Jen kelkaj sugestioj pri diversaj temoj:

— historio de la lingvo: Historio de la lingvo Esperanto, Privat; Gvidilo Tra La Esperanto-Movado, De Bruin.

— nuna situacio de la Movado: Jarlibro de U.E.A., revuoj Esperanto kaj Brazila Esperantisto, Setenta Anos de Esperanto.

— ludoj: Societa Ludaro, Per kio Ni Amuzu Nin, Internacia Frazludo, Pulĉinelo Konstrua Vortludo, Miru Pensu Ridu, Proverbaro Esperanta de Zamenhof, Gaja Leganto.

— gramatiko: Ekzercaj Taskoj Por Daŭrigaj Kursoj, Cseh; Ekzercilo — Helpilo por Supera Praktika Kurso, Mazzolini; Esprimo de Sentoj en Esperanto, Privat; Lingvo kaj Vivo, Waringhien; Populara Lernolibro de Esperanto, Kokeny.

— vivo de Zamenhof: Memolibro Pri la Zamenhofa Jaro; Vivo de Zamenhof, Privat; Zamenhof Iniciador do Esperanto, Luna (C. Domingues)

— verkoj de Zamenhof: Originala Verkaro, Leteroj, Zamenhofa Legolibro, Pensoj de Zamenhof, La Batalo de l'Vivo, Georgo Dandin, La Revizoro

— teatro: Teatro de Machado de Assis; Teatro en Societo, E. Lapenna; Analfabeto kaj Butono,

— poezio: Elektitaj Poemoj de Castro Alves; Rozoj kaj Urtikoj; Sonetkrono por la Esperantistaro

PARA O ENSINO PELO MÉTODO DIRETO

	Cr\$
Privilegia Vojo, Setälä. Recomendado por U.E.A. para os cursos em todo o mundo	600,00
Esperanto Série Pedro II. Edição da Liga Brasileira de Esperanto. Quadros para aquisição de vocabulário	50,00
Konversacia Literaturo, Cseh. 8 folhetos	480,00
Konversacia Vortaro Amuza, Cseh	120,00
Ekzercaj Taskoj Post Daŭriga kurso. Cseh. 6 folhas	90,00
Populara Lernolibro de Esperanto, Kökény. Método internacional para principiantes	360,00
Esperanto Lernolibro por Popollernejoj, Degen. Com ilustrações coloridas	360,00
Tra la Jaro, Lucy E. Waddy. Para principiantes de todos os países.	300,00
Esperanto por Infanoj, G. Solomon	360,00
Ekzercilo-Helpilo, Mazzolini. Para curso prático superior	540,00

NOVA STRATO ZAMENHOF

La revuo *Nia Ligilo* (okt. 1962) sciigis, ke la urbestro de la urbo Bat-Jam, Israelo, decidis nomi unu straton per la nomo de d-ro Zamenhof.

— kanto: Internacia Kantaro; La Espero

— geografio: Aŭstralio, Lando kaj Popolo; Bulgario; Jugoslavio kaj Ĝiaj Popoloj; Skizo pri Ekonomia Geografio.

Kiel dirite la supra tabelo estas nur sugestio. Ĉio dependas de la lerteco de la gvidanto. Eĉ el verkoj kiaj Plena Vortaro de Esperanto kaj du-lingvaj vortaroj oni povas elpreni kurizajojn, sed ĉiam atentante, ke niaj kunvenoj devas esti interesaj kaj bone preparitaj.

NEKROLOGO

Rogério Pongetti

Nia bona amiko S-ro Rogério Pongetti, ĉefa estro de la firmo Irmãos Pongetti Editores, mortis en la 2-a de Marto lasta. Ekde la fondo de tiu plej reputaciata eldonejo en 1925 ĝi kunlaboras kun nia Movado, ĉu per la presado, ĉu per la eldonado, ĉu nun per la disvendado de niaj libroj.

Rogério Pongetti estis sincera amiko de nia afero, kiu devas multon al li. Pro lia perdo ni kondolencas lian edzinon kaj liajn fratojn Rodolfo kaj Henrique.

PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO

de Kalocsay e Waringhien (da Academia de Esperanto)

Volume I Cr\$ 2.100,00

— o —

Série de 10 livros infantis ricamente ilustrados.

12 páginas, 16 x 17, capa de cartolina. La ratkaptisto Hameleno, Vespero en la cirko, Pli kaj pli rapide, La kuraga tamburisteto, Kun niaj amikoj, la Bestoj, Orharulo kaj Rugakresto, Kaj nun ni eklaboru, Aladino kaj la mirinda lampo, Kampomuso ekskursas, Eta plumba soldato.

Preço da série Cr\$ 1.800,00

DU GENERACIOJ

Sur strato de Tel Aviv renkontigas du konatuloj kaj post kortuŝa reciproka salutado ili parolas pri la hebrea lingvo.

Diras unu: "Vi estas, ŝajne, 15 jarojn ĉi tie, kaj vi certe bonege parolas hebrean lingvon?"

— Jes, mi estas ĉi tie delonge, respondas la dua. — Sed la lingvo estas tiel malfacila, ke ĝis nun mi konas nur du vortojn: "Toda" (Dankon) kaj "Sliĥa" (Pardonon).

— Kaj viaj infanoj?

— Ho, miaj infanoj parolas tre flue hebrean lingvon, sed ĝuste tiujn du vortojn ili ne konas.

DIVERSAĴOJ NE MALTRANKVILIĜU!

CIDADE DA FRATERNIDADE

Organização Social Cristã "André Luiz" — OSCAL — lanĉou as bases da Cidade da Fraternidade, — Lares — Família, para a criança abandonada — em Goiaz, no coração geográfico da Pátria. Secretaria no Est. de S. Paulo: Av. Ipiranga 1208, 4.º S. Paulo, cap.

HAMBURG — Interesa prospekto, kun priskribo de tiu urbo kaj nombraj vidoj kaj ilustraĵoj.

La glumarko de la 48-a

Bela okkolora glumarko, propagando pri la Universala Kongreso en Sofio. Ĝi kontentigas la deziron de multaj esperantistoj.

Monda Kulturo — Prospekto kun mendilo pri la nova kultura revuo de UEA "Monda Kulturo". Formato de la revuo "Esperanto" kaj amplekso de 32 paĝoj. Jarabono 60 steloj. Tiu nova trimonata revuo anstataŭas la kajeron "Belarto".

PARGETERO ESPERANTO — Geraldo L. Galvão

Prospekto kun modeloj de pargetoj: Mod. 90, Zamenhof, mod. 20, Stelaro; mod. 30, Eŭropo; kaj pluraj aliaj.

EDIÇÕES BÚLGARAS

Bofilino — G. Caraslov (S. e A. Simeonov), romanço. Enc. Cr\$ 1.620,00

Bulgario — Tudo sobre a Bulgária. Enc., ilustr. Cr\$ 1.620,00

Bulgara Prozo — Enc. ... Cr\$ 1.620,00

Elektitaj Versaĵoj — Nikola Vapcarov Cr\$ 840,00

Sub la Jugo — Ivan Vazov (S. e A. Simeonov), romanço do tempo da dominação turca Cr\$ 2.400,00

Nur du aferoj povas vin maltrankviligi:

Aŭ sukcesi aŭ malsukcesi.

Se vi sukcesos.

Nenia motivo estas por maltrankviligi.

Se vi malsukcesos, el du, unu afero:

Aŭ vi bonfartas aŭ vi malsanigas.

Se vi bonfartas.

Nenia motivo estas por maltrankviligi.

Se vi malsanigas, el du, unu afero:

Aŭ vi resanigos aŭ vi mortos.

Se vi resanigos.

Nenia motivo estas por maltrankviligi.

Se vi mortos, el du, unu afero:

Aŭ vi iros en la ĉielon aŭ en la "inferon".

Se vi iros en la ĉielon.

Nenia motivo estas por maltrankviligi.

Se vi iros en la "inferon".

Vi estos devigata komplimenti tiom da konatuloj.

Ke vi ne havos tempon por maltrankviligi.

El la portugala traduko de

Guilherme Almeida

Esperantigis C.C.

ATENTU FILATELISTOJ!

La unua filatela firmo en Brazilo gvidata de Esperantisto.

Ni atendas mankolistojn kaj rezervas novaĵojn laŭ peto.

Ni sendas ankaŭ per "Reembolso Postal" en la tuta Brazilo.

Studio Filatélico Paranaense

Rua Júlia Wanderley, 520

Caixa Postal 148

Curitiba — Paraná — Brazilo